# KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO

NUMERO 310 (77) KVINA EPOKO MARTO 2000



ESPERANTO EN UNIVERSITATO 2

ASEMBLEA RAPORTO 3

EŬROPA ANGULO 7

KEJ-AGADO 8

ARANĜOJ 10

RECENZOJ 11




ASSOCIACIÓ CATALANA D'ESPERANTO — KATALUNA ESPERANTO-ASOCIO
Apartat, 290 - 08200 - SABADELL
CATALUNYA - KATALUNIO

Registrita ĉe "Generalitat de Catalunya" en la unua sekcio per n-ro 5785

Kolektiva membro de Literatura Foiro Kooperativo
Membro de FOCIR (Federacio de Katalunaj Organizaĵoj Internacie (ne) Agnoskitaj)

Peranto de UEA, FEL, *Literatura Foiro*, IKEL, *La Kancerkliniko*, *La Dua Jarcento (IEM)*, *La Ondo de Esperanto (peras aliajn revuojn)*

Apartat/Poŝtkesto 290-08200 SABADELL (Vallès Occidental)
Catalunya/Katalunio Tel + Fakso: 93-716 36 33, (ekde lundo ĝis vendredo inter la 17a kaj 20 h.)

**Ret – adreso**: kea@stel.net
**Ret – paĝo**: http://www.stel.net/esperanto/kea
**Kotizoj por la jaro 2000**: Individua Abonanta Membro 3.500 p-toj; Individua Subtenanta Membro 7.000 p-toj; Individua Dumviva Membro 70.000 p-toj; Kolektiva Membro 7.000 p-toj; Juna Membro 2.500 p-toj.

**Banko**: Caixa d'Estalvis i Pensions de Barcelona – Agència 461 Sabadell, Kontonumero: 2100 0461 90 0200055053.

**Plenumkomitato de KEA**: Prezidanto: Neus Moly; Vicprezidanto: Josep Franquesa; Ĝenerala Sekretario: Xavier Rodon; kasisto: Llibert Puig; Komitatanoj: Lluís Aragay, Mercè Porta, Luz Vàzquez, Sun Farràs, Roger Prieto.

**Kontrola Komisiono:** Miquel A.Altuna, Arnald Massanas,Lluís Armadans

Kataluna Esperantisto: Pere Bernús, Llibert Puig, Marina Ollé, Pako Belmonte

La artikoloj publikigitaj en Kataluna Esperantisto ne nepre esprimas la starpunkton de KEA, se ili ne estas subskribitaj ĝianome.

**Kataluna Esperanto-Junularo**: Apartat 32.318 - 08080 Barcelona

**Imprès a/Presita ĉe**: Prest Graf. Sabadell. Tel. 93 725 50 91

**Dipòsit Legal:** B-27362 - 1982

## ESPERANTO EN LA UNIVERSITATO

Dua nova kurso universitatnivela komenciĝis gvide de nia prezidantino D-rino Neus Moly (legu pli detalan raporton sub Nia Agado/Instruado, sur paĝo 4-a)
Kun ĝojo ni povas anonci ke nia asocio subskribis kontrakton pri daŭra kunlaboro kun la Aŭtonoma Barcelona Universitato, kio rajtigas nin ne nur okazigi kursojn, sed ankaŭ aliajn aranĝojn kun la asigno de universitataj kreditoj. Pri la evoluo de tiuj rilatoj ni daŭre informos niajn membrojn.

## NIA BIBLIOTEKO/ARKIVO "PETRO NUEZ"

Ĝi celas helpi niajn membrojn pri diversaj aspektoj: ĉu vi deziras kompili la E-historion de via loĝloko? En nia biblioteko vi trovos binditajn jarkolektojn de la revuo **Kataluna Esperantisto** de la jaro 1910 ĝis 1932 (tamen kun kelkaj mankoj, kiujn espereble ni baldaŭ kompletigos) kaj de **Hispana Esperantisto** de 1917 ĝis 1920. Tio se temas pri pasintaj epokoj, ĉar pri la postmilita epoko ni havas abundan materialon.
Ĉu vi devas prepari gimnazian aŭ universitatan laboron pri faka temo? Elektu la temon Esperanto kaj en nia Biblioteko kaj Arkivo certe vi povos ĉerpi la konvenajn informojn.Eĉ se temas pri kursfina kariera tezo, ankaŭ ĝi povas helpi sufiĉe (mankantajn informojn vi trovos ĉe kunlabora Bibliotekoj, kiujn ni rekomendos al vi).
Ĉu vi interesiĝas pri E-literaturo? En nia biblioteko vi trovos sufiĉajn librojn (ni listigas ilin aparte) eĉ vi trovos la preskaŭ kompletan kolekton de la prestiĝa revuo **Literatura Mondo.**
Ankaŭ la Arkivo povas vin helpi plurrilate. Vi trovos la tutan materialon de KEA de post ĝia fondiĝo kaj dokumentojn pri forpasintaj elstara katalunaj esperantistoj; ankaŭ kelkajn dokumentojn pri la antaŭmilita KEF kaj kolektojn de fotoj, gazeteltranĉaĵoj, E-poŝtmarkoj kaj glumarkoj ka nepre menciinda estas nia gazetoteko (kolekto da diversaj revuoj: katalunaj, hispanaj, internaciaj, fakaj kaj alilandaj).

### Biblioteka konsisto laŭ fakoj

Ni jam enkomputiligis ĉiujn librojn laŭ titoloj kaj aŭtoroj, kio faciligas la rapidan konsulton .Sekvas la enlistigo:

Lernolibroj
Legolibroj
Vortaroj /Terminaroj
Infana Literaturo
Movado
Lingvo/Esperantologio
Fak-Literaturo diversa
Prozo Originala
Prozo Tradukita
Poezio Originala
Poezio Tradukita
Antologioj
Teatro Originala
Teatro Tradukita

## INSTRUADO

Laŭ informoj ricevitaj en nia redakcio, ni scias ke la instruado de Esperanto okazas dum la nuna lernojaro en la jenaj urboj:
En **Barcelono** ĉe Unesko-Klubo okazas la dua universitata kurso gvide de nia prezidantino D-rino Neus Moly, kaj same kiel la unua, la sukcesintaj lernantoj ricevos 3 kreditojn de la Aŭtonoma Universitato de Barcelono.
En **Blanes** la sekretario de la Kataluna Sekcio de ILEI Pedro M.Martin gvidas jam la duan fojon oficialan kurseton en la mezlernejo IES Serrallarga, ĉi-jare kun 9 entuziasmaj geknaboj.
En **Reus** nia estraranino kaj instruistino Luz Vazquez gvidas E-kurson ĉe la loka Liberecana Grupo. Ankaŭ en ties revuo “La Lletra A” oni daŭre aperigas E-lecionojn.
En **Sabadell** okazas 4 kursoj.Unu elementa en la sidejo de CES(Centro de Esperanto Sabadell) kaj alia ankaŭ elementa ĉe la loka CNT-sindikato, ambaŭ gvidataj de nia kasisto Llibert Puig; mezgrada kurso en la sidejo gvidata de Ramon Llop kaj infana kurso gvidata de Silvia Simó.
En **Tarragona** ĉe la Hospitalo Joan XXIII, kie pasintjare komenciĝis elementa kurso, en la nuna okazas dunivela kurso ankaŭ gvidata de nia aktivulo Joan Marimon.

## RAPORTE PRI NIA ASEMBLEO

Ĝi okazis ĉe Unesko-Klubo en Barcelono sabaton la 18-an de marto kun tre magra partopreno, kio tamen ne ŝparis intereson pri la disvolviĝo de nia ĉiujara intermembra kunveno.Kiel kutime la ĉeestantoj ricevis broŝuron kun reprodukto de ĉiuj pritraktotaj temoj laŭ la anoncita tagordo,t.e.: Kunvokilo (kiun la membroj jam estis ricevinta kun la antaŭa revuo), Protokolo de la pasintjara Asembleo, Agadraporto de la asocio, Spezkontoj kaj Bilanco, ĉiuj pri 1999 kaj laste Buĝeto por la jaro 2000. Mankis la Propono de agado por la jaro 2000, kiun la sekretario verkis kaj mem legis dum la Asembleo.
El ĝi elstaris la evidenta intereso pri la interreta debato kiu okazis de post la eksterordinara Asembleo en Manresa kaj la alprenita decido sendi al ĉiuj membroj la du pretigitajn revuojn de Ferriol Masip kaj Pako Belmonte kun rekomenda kunletero de nia prezidantino por instigi aliajn membrojn al partopreno. Post du-aŭtrimonata atendo Pako mem sin proponis por kompletigi la tuton por posta debato en speciala kunvokota kunveno.
Oni pritraktis la aferon de la Pakto por Esperanta Civito, kiun oni rifuzis akcepti en la nuna momento kaj atendi estontajn pli klarajn kialojn pri la celoj de tiu projekto.
Unuavoĉe aprobiĝis la pasintjaraj protokolo, agadraporto, bilanco, buĝeto kaj propono por venontjara agado, kiun aparte ni resumas.
Pro la elĉerpo de siaj du sinsekvaj mandatoj ĉesis estraraniĝi la komitatanoj Pako Belmonte kaj Felip Artero kaj demisiis Lluís Armadans pro privataj kialoj.Sin proponis Roger Prieto, kiun la Asembleo akceptis.

## AGADPLANO POR LA JARO 2000

La Estraro pledas por progresigo de nia asocio diversnivele, kaj tio eblas nur per pli granda respondeco de ĉiuj estraranoj kaj pli vasta kunlaboro de la membroj.
Nepras ke la estraranoj respondecu pri konkreta laboro kaj tiucele prezentiĝos propono en nia unua postasemblea estrarkunveno.
Ni bezonas entuziasmigi la membrojn per belaj aranĝoj kaj strategia laborplano, kio instigos ilin kunlabori sur konkretaj projektoj, ĉu en komisionoj ĉu individue.
Kreskigi nian membraron estas nepra bezonaĵo kaj tio postulas interesajn servojn. Celi la profesiigon de nia asocio certe povas helpi kaj ni ekos tiudirekte laŭ niaj ebloj.Jen nova defio por ni ĉiuj.
Urĝas bona informado al la ne-esperantista publiko kaj tiucele ni devas pretigi modernajn informilojn kaj nepre flegi la amaskomunikilojn per akurata kaj kvalita informado.
Plibonigi la lingvan kaj kulturan nivelon de niaj membroj per la organizo de seminarioj, fakaj kursoj kaj prelegserioj estas ankaŭ alstrebinda klopodo.
Intensigi niajn rilatojn kaj aranĝojn universitatnivele estas prioritata afero, kion la nuna kunlabora kontrakto ege faciligos.
Potencigi la favoran evoluon de KEJ nepras en la kadro de nia agadplano

## SPEZOKONTO DE KEA DUM 1999

### ENSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Membrokotizoj | 599.250'— |
| Kotizoj 99 Dumvivaj Membroj | 20.450'— |
| Libroservo | 189.649'— |
| Perado revuoj +UK-Berlino | 1.052.435'— |
| Aranĝoj | 926.000'— |
| Koresponda kurso | 41.909'— |
| Vendo fotokopioj | 5.645'— |
| Abonoj Kataluna Esperantisto | 2.975'— |
| Fondaĵo komputilo | 3.400'— |
| Bankaj interezoj | 630'— |
| | **2.842.343'—** |

### ELSPEZOJ

| | |
|---|---|
| Administrado | 137.885'— |
| Aranĝoj | 1.185.604'— |
| Sidejo | 50.000'— |
| Libroservo | 78.008'— |
| Perado revuoj + UK-Berlino | 1.042.423'— |
| Kataluna Esperantisto | 226.600'— |
| Koresponda kurso | 545'— |
| Bankaj kostoj | 28.019'— |
| Biblioteko | 24.370'— |
| Profito | 68.889'— |
| | **2.842.343'—** |

## BILANCO DE KEA JE 31.12.99

### AKTIV0

| | |
|---|---|
| Kuranta kaso | 40.993'— |
| Konto Ŝparkaso | 483.313'— |
| Libroserva stoko | 56.898'— |
| Eldonejo Sirius | 2.163'— |
| UEA (kredita saldo) | 52.183'— |
| Enspezotaj kotizoj | 65.500'— |
| Faksilo (12.825-12.825 amortizo) | -- |
| Komputilo (109.824-27.456 amortizo) | 82.368'— |
| Fotokopiilo (104.000-26.000 amortizo) | 78.000'— |
| | **861.418'—** |

### PASIV0

| | |
|---|---|
| Asocia bonhavo | 212.745'— |
| Dumvivaj Membroj (140.600-20450) | 120.150'— |
| Pagotaj revuaj abonoj | 132.165'— |
| " KEJ 98+99 | 50.150'— |
| Patronaro P.Nuez | 257.119'— |
| Fondaĵo komputilo | 20.200'— |
| Profito | 68.889'— |
| | **861.418'—** |

**PRI NIA KATALUNA KONGRESO**

Ankoraŭ ni povas rememori la agrablan omaĝon al la kongresurbaj veteranoj Pere Saumell kaj Modest Tuset dum la solena inaŭguro de la Kongreso per legado de la interesa panegiro, kiun verkis kaj legis ĝia aŭtoro Gabriel Mora i Arana.

La tekston ni reproduktas laŭ la kataluna originalo, sed tamen ni volonte liveros la esperantan tradukon, se iu nekataluno interesiĝas kaj memkompreneble laŭ traduko de la aŭtoro mem.

“” Il.lustre Sr.Alcalde, Regidor, Congressistes, amics tots!

Del 31 de maig al 2 de juny de 1936, tretze anys després del 10è Congrés de la Federació Catalana d’Esperanto celebrat a Manresa el 1923- el primer en la nostra ciutat, tal com s’acaba de dir en aquest solemne acte inaugural-, la capitaldel Bages tornà a aplegar-ne un altre, per segona vegada: doncs, el 18è. I ara, ja a les envistes del 2000 i per tercer cop, el 29è.

Ës avinent de fer constar que només un dels membres d’aquell Comitè Organitzador de 1923 ho tornà a ésser en el de 1936. Aquesta persona era l’Àngel Llobert i Cornet, el qui, fins a la seva mort esdevinguda el 3 de juny de 1961, fou el més autèntic valedor moral de l’esperantisme a Manresa, tant abans com després de la difícil època de la postguerra.

En el present Congrés ja no és possible de comptar, naturalment, amb ningú de 1923, però sí que més d’una persona, o de les persones que formaren part d’aquella Junta Local, en la segona època o període del Grup Bela Espero fundat l’any 1922 per aquell mestre, pedagog de grata memòria, tant a Manresa com allà on exercí la seva professió, que fou en Josep Albagés.

Sortosament, doncs, encara podem comptar entre nosaltres amb la presència d’algú que formà part del Comitè Organitzador d’aquell ja citat Congrés de 1936, o bé de la Junta d’aquell històric i actiu Grup Local. Ens referim a Modest Tuset i Canet i a Pere Saumell i Vila, els quals, des de llavors ençà i sense interrupció, s’han mantingut activament fidels a l’ideal esperantista i com a ferms testimonis i garants dels valors sempre vàlids, pràctics i reconeguts de la Llengua Internacional, ja que no s’han fet mai enrere en el voler-se comprometre en la seva difusió, en el seu ús, ensenyament i estudi. I també volem recordar que no fa pas gaires mesos ens deixà un altre dels joves aprofitats i entusiastes practicants d’aquells temps i de sempre. Ens referim a en Josep Comas i Palomas.

Modest Tuset, esperantista, que, alhora, és un poliglot reconegut, pot donar-nos bona raó de com l’Esperanto, en les seves personals relacions internacionals , li han obert incomptables portes, fins a l’Àsia, i de quina manera pràctica emprà aquesta llengua durant el seu obligat exili tot just acabada la Guerra Civil; i de com aprengué, mentrestant i a consciència, la llengua occitana.

Pere Saumell i Vila, diligentment aprofitat de les lliçons pràctiques rebudes d’una professora estoniana, Elinjo Pähn , que sojornà a Manresa en un període d’avantguerra, i animador entusiasta d’aquella Bela Espero, és un dels que sostingué el pòndol del ja tan citat Congrés de 1936.I fou ell qui amb notòria personalitat i autoritat, en temps de postguerra, a l’inici dels anys 50, i sota la tutela del llavors recentment fundat Lingua Club, féu ressorgir l’ensenyament de l’Esperanto a la capital del Bages, i que, amb continuïtat, uns anys més tard, reprengué aquesta meritòria tasca, sempre amb una característica molt particular i peculiar, com és la de fer-ho, des del primer dia, segons el seu propi mètode d’ensenyament de l’idioma.

Ambdós, Tuset i Saumell, Saumell i Tuset, signifiquen un bon exemple de perseverança, de convenciment i bon fer, per tot el que fa a les bondats d’aquesta llengua creada per aquell gran i savi humanista i idealista, el Doctor Zamenhof.

La Kataluna Esperanto-Asocio reconeix, doncs, en aquesta seva nova vinguda a Manresa, l’entusiasme i el bon treball d’aquests dos bons amics manresans esperantistes.

La nehaltebla forpaso de la jaroj neniam malpliigis tiun vian junaĝan entuziasmon, favore je tiu ilo de interkomunikiĝo kiu staras super ĉiuj lingvaj baroj, ĉar en via longa vivspertiĝo Esperanto pli kaj pli logis vin, kaj vi konstante sentis vin dankaj al ĝi.

És a dir, tradueixo:

L’indeturable pas dels anys mai no ha afeblit aquell vostre entusiasme de joventut per tot el que fa a aquest mitjà d’interrelació que està per damunt de totes les barreres lingüístiques, puix que, en la vostra llarga experiència en la vida, l’Esperanto constantment us ha seduït, i vosaltres li heu agraït i l’hi esteu agraint.

# L'EUROREGIÓ

## La cooperació interregional en el marc de la Unió Europea



# LA INTERREGIONA KOOPERADO EN LA KADRO DE LA EŬROPA UNIO

La Pireneoj estas la vertebra kolumno de la Eŭroregiono,laŭmeze trapasanta, dividanta kaj unuiganta ĝin samtempe. Katalunio, Langvedoko-Rusiljono kaj Sud-Pirineoj havas 104.619 km.2, prok. 5 % de la Eŭropa Unio, kie ĝi troviĝas kaj celas en ĝi diskonigi ĉi tiun eŭroregionan spacon. Kun 10'6 milionoj da enloĝantoj, la Eŭroregiono havas 3 % de la Unia loĝantaro; aŭ tiom kiom Belgio kaj eĉ pli ol Danio, Luksemburgio kaj Irlando.

Interne, ĉiu regiono havas siajn specifaĵojn. La plej vasta estas Sud-Pireneoj (ĝi ampleksas 40 % de la eŭroregiona spaco) kaj Katalunio la plej loĝata (kun 60 % de la loĝantaro de la Eŭroregiono) kaj ĝi havas ankaŭ pli da enloĝantoj po kvadrata kilometro. Langvedoko-Rusiljono estas do, la plej malvasta kaj la plej maldense loĝata.

Administracie, la tri regionoj ankaŭ ne estas homologeblaj. Katalunio estas aŭtonoma komunumo inter la 17 kiuj formas la hispanan ŝtaton kaj dividiĝas je 4 provincoj kaj 41 komarkoj. Sud-Pirineoj kaj Langvedoko-Rusiljono estas du regionoj de tiuj 22 de la franca ŝtato. La Regionoj estas teritoriaj kolektivoj plenrajtaj je elektado, per universala voĉdonado kun propraj Asembleo aŭ Regiona Konsilio. La francaj regionoj kompetentas pri ekonomia evoluo, teritoria ordigo, meza kaj profesia edukadoj. Ĉiu regiono de la franca ŝtato dividiĝas en departementoj, similaj, kun malgrandaj diferencoj al la hispanaj provincoj.

Langvedoko-Rusiljono havas kvin departementojn: Auda, Gard, Erau, Losera kaj Orientaj Pireneoj.

Sud-Pireneoj havas 9: Arieja, Avairon, Garona, Gers, Nauta Garona, Nauts Pirineus, Lot, Tarn kaj Tarn e Garona.

La unua urbo de la Eŭroregiono estas Barcelono kun 1.800.000 loĝantoj mem kaj kun entute pli ol tri milionoj se oni inkluzivas la metropolitan areon.La ĉefurbo de Sud-Pirineoj, Tolosa de Llenguadoc (Tuluzo el Langvedoko), havas kun entute 58 municipoj, 650.336 loĝantojn. Montpeller ĉirkaŭ 350.000, sed Langvedoko-Rusiljono estas la franca regiono kiu pli multe kreskis demografie. Inter la jaroj 1982 kaj 1990 ĝi ricevis preskaŭ 200.000 loĝantojn. En ĉi tiu regiono 68 % de la aktiva loĝantaro laboras en servoj, ĉefa sektoro de la ekonomia aktiveco, kaj sekvas tre malproksime la industrio 13'5 %. Tiu proporcio similas ĉe Sud-Pireneoj (servoj 61'7 % kaj industrio 18'4 %), sed malsimilas en Katalunio, kie la industria sektoro kun 35'4 % estas ankaŭ dualoka, sed pli forta. Teksa kaj metalurgia estas la du industriaj sektoroj kun pli da laborlokoj en Katalunio, kvankam nun okazas gravaj transformiĝoj kaj restrukturiĝoj. La industrioj pri la novaj teknologioj pli kaj pli prosperas en la sekundara kataluna sektoro.En Langvedoko-Rusiljono, la industria sektoro suferas profundan mutacion. La modernigo de la tradiciaj industrioj (teksa, metalurgia kaj agronutrada) kombiniĝas kun la starigo de novecaj industrioj (nuklea, biomedicina, elektronika kaj informatika). La industrian specialiĝon alportas Sud-Pireneoj, kiu de post la fino de la Unua Mondmilito elstaras en la aeronaŭtika sektoro. Tiu industrio koncentriĝas en la urboj Tuluzo kaj Tarba kaj plej elstaras la entrepreno Aérospatiale, kiu konstruas la aviadilon Airbus. En tiu kampo ankaŭ elstaras la Nacia Centro de Spacialaj Studoj kaj ĝiaj filioj: Spotimage aŭ Argos. La sekundara sektoro komplementiĝas kun elstaraj industrioj de alta teknologio, kiel la elektronika, farmacia kaj informatika kun granda scienca esplora forto.

Estas ekonomia aktivaĵo kiu unuigas la tri regionojn: la turismo.Kaj de maro kaj de montaro, ĝi estas ene de la terciara sektoro, la plej vigla kaj en la eŭroregiona kooperado unu el la spacoj pli antaŭpuŝita.

# KEJ-AGADO

En la Asembleo okazinta sabaton la 11an de decembro 1999 ĉeestis 9 membroj de KEJ kaj kromaj 5 kunlaborantoj.
Unue oni voĉdonis unuanime la novan estraron ,kies konsiston ni anticipis sur nia antaŭa revuo 309 (paĝo 7).
Oni komentis ĉiujn funkciojn kaj oni starigis la jenajn komisionojn:

**Lingva kaj prieldona komisiono**

Tie oni diskutos pri eldonado de flugfolioj kaj broŝuroj katalun-kaj multlingvaj.
Ni debatis pri la bezono eldoni diverstipajn informilojn.

**Informa komisiono ĉe publikaj bibliotekoj**

Ĝi kontrolos la nunan staton kaj kvanton da esperantistaj eldonaĵoj ĉe la bibliotekoj.
Ankaŭ klopodos influi la respondeculojn pri aperigo/pligrandigo de esperantistaj libroj en ties arkivoj.

**Informa komisiono ĉe porjunularaj informejoj**

Tie oni planos kampanjon por tiaj informejoj.

**Kursa komisiono**

Ĝi pretigos kurson por la unua duono de la jaro 2000, ligante tion al kursfina vojaĝo al KAFE julie.

**Ekonomia komisiono**

Pridiskutos eblecojn enspezi monon kaj eventualajn ŝanĝojn je membro-kotizoj kaj kategorioj.
Oni debatis pri la statuto kaj oni interkonsentis daŭrigi la debaton ĝis Eksterordinra Asembleo, kiu povas ŝanĝi kelkajn artikolojn. Oni interkonsentis kiel provizora dato por ĝi sabaton la 12an de februaro 2000.Verŝajne oni ne ŝanĝos multe la enhavon, sed eble oni akceptos novajn membro-kategoriojn kaj patronecajn alportojn. Xose M.Conde komentis pri la Regularo de KEJ, sed neniu el la ĉeestantoj konis ĝian ekziston aŭ iaman funkciadon.(Bonvolu informi tiuj, kiuj ion scias pri tio).
Pri la ofteco de la kunsidoj, oni interkonsentis ke la unuan merkredon ĉiumonatan okazu pliserioza kaj pli decida renkontiĝo ĉe la kutima loko de la ĉiusemajna renkontiĝo, tio estas: la muziktrinkejoen strato Praga,3 de Barcelono (tel.93-450.1512).
Pri la stato de la servoj de la asocio:

-Oni studos eblecon okazigi enkondukan semajnfinon printempe.
-Oni finpretigos la KEJ-arkivon kaj bibliotekon.
-Oni kompilos informojn pri nunaj kurs-eblecoj en Katalunio.
-Oni redaktos broŝuron por helpi memlernantojn.(konsulta telefono estos tiu de Lluís Garcia 93-458.5142 kaj konsulta fakso estos tiu de la librovendejo de Carles Berga 93-246.3736)
-Oni starigos gazetarajn rilatojn kun eksterlandaj esperantistaj kaj enlandaj ne-esperantistaj asocioj.
-Oni peros vendojn kaj abonojn de libroj kaj gazetoj.
-Oni klopodos plej baldaŭ aranĝi retpaĝon de KEJ
-Oni malfermos datumbazon pri membroj kaj interesiĝantoj.
-Oni prioritatigos la bazajn servojn antaŭ amase kampanji celante novajn membrojn.

Pri la revuo Kata-Luno estos pruva periodo dum kiu oni publikigos du versiojn (unu precipe katalunlingva kaj alia entute esperanta, laŭ ties malsama celata legantaro) Ambaŭ eldonoj estos pretigitaj antaŭ la Eksterordinara Asembleo.
Oni prokrastas debaton pri la 5-a Kataluna Diskut-Kunveno, kvankam oni celas okazigi ĝin dum la jaro 2000.
En organo laŭstatute nomata Respondeca Konsilantaro daŭre laboros Carles Berga, Felipe Artero kaj Pako Belmonte.
Oni instigas la partoprenantojn kompletigi per aldonoj kaj komentoj tiun ĉi unuan seriozan protokolon de la nova KEJ, samkiel oni invitos la neĉeestintojndemandi pri detaloj kaj partopreni la novan periodon, ĉu pere de dissendlisto, ĉu per membriĝo, ĉu per helpo al la komisionoj,kaj tiel plu.
Poŝtaj adresoj de KEJ estas tiu de la poŝtkesto (Apartat de Correus, 32.318-08080 Barcelona kaj tiu de la prezidanto: Lluís Garcia i Casademont-c/Pere Costa, 10-2-1-08024 Barcelona.
Barcelono 13.12.1999
Pako Belmonte (eks-kunordiganto de KEJ)

La Eksterordinara Asembleo de KEJ okazis sabaton la 12-an de februaro 2000 kun ĉeesto de 11 membroj kaj 4 kunlaborantoj.
Oni legis kaj aprobis la antaŭan protokolon.Oni komentas la agadon de la koncernaj komisionoj.Kvankam plimulto el ili daŭre stagnas,ĉiuj el la celoj restas realigendaj.Haritz Ferrando kaj Robert Tolosa respondecos pri la informa komisiono ĉe publikaj bibliotekoj.
Publikigo de esperantlingva revuo estas tre proksima.Same pri la katalunlingva.
Oni debatis longatempe pri la amendoj al la statuto de KEJ. Ĉiujn amendojn oni aprobis unuanime.

**Statut-ŝanĝoj**

Article 2.- (..) afegir V.-promoure l'intercanvi cultural mitjançant l'Esperanto
Article 3.- (..) canvi domicili: c/Pere Costa,10-2-1-08024 Barcelona
Article 5.1.-(És constituïda per tots els socis) afegir: numeraris.
Article 5.2.2 (..) canviar "cada mes" per "cada dos mesos".
Article 5.3.- afegir "escollides per la Junta Directiva".
Article 6. (..).- afegir "Hin haurà dos tipus de socis: numeraris i simpatitzants".
Article 7.- Es refereix als socis numeraris.
Article 8.- Es refereix als socis simpatitzants: no tenen el dret c) dels numeraris i al d) s'aclareix que tenen veu, però no vot a l'Assemblea. També que no tenen el deure b) dels numeraris.
Article 9.- abans article 7.3
Article 10.- abans article 8
Article 10.-afegir al punt 10.1.-:e) Els esperantistes i simpatitzants de més de 30 anys que vulguin col.laborar amb una quota de patronatge. Aquests patrons rebran informació de les activitats de KEJ i totes les seves publicacions periòdiques.No es consideraran mai com a socis tot i pagar una quota mínima fixada per l'Assemblea.
Article 11.-abans article9.
Oni rendevuos ĉe la KEA-asembleo okazonta la 18an de marto.

**INTERNACIE**

Kun ĝojo ni legis kaj vidis en la junulara revuo Kontakto la komikson laŭ la titolo **Ŝvit-Vir'** de nia juna membro Robert Tolosa Biosca el Igualada. Ni gratulas kaj instigas lin al plia kaj plua kunlaboro internacinivele.

**TRAJNA KARAVANO AL IJK**

TEJO preparas neforgeseblan travivaĵon lige kun la ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso en Honkongo. Temas pri trajna karavano el Moskvo al Honkongo, kiun TEJO organizas kune kun siaj landaj sekcioj en Rusio (REJM) kaj Ĉinio (ĈJEA).
La karavano startos la 17an de julio, kiam la partoprenantoj renkontiĝos en Moskvo. De tie ili vojaĝos tra Siberio, Mongolio kaj Pekino al la sudĉinia metropolo. Okazos restado en Tomsk (kun partopreno en la junulara tendaro OrSEJT) kaj, laŭ la elekto de la partoprenantoj, aŭ en Mongolio aŭ en Pekino.
Eblas legi en la reto pli detalajn informojn kaj printi paperan aliĝilon. Du GIF-datumaroj estas printeblaj sub la adreso: http://tpp24.net/Holger.Boos
Kaj baldaŭ ankaŭ en la TEJO-paĝoj: http://www.esperanto.org/internacia/tejo
Bonvolu atenti, ke pro organizaj kialoj oni povas akcepti aliĝojn nur ĝis la 1-a de majo!

**Kvara Eŭrop-Unia E-Kongreso**
Okazonta en Oostende (Belgio) inter la 27-a de aprilo kaj la 1-a de majo,ĝi pritraktos la temon: "Ekologio, ŝlosilo por la tria jarmilo".Interalie la programo konsistos el : kolokvo ka tagmanĝo ĉe la Eŭropa Parlamento;gvidata vizito al la centro de Bruselo; vizitoj al la ekologia centro de Oostende kaj al la Provinca Bieno Raversijde; marveturo al Nieuwpoort kaj diversaj prelegoj pri la kongrestemo.Aliĝiloj riceveblaj ĉe nia asocio.

**Hispana E-Kongreso**
Ĝi okazos de la 29-a de aprilo ĝis la 1-a de majo 2000 en la urbo San Sebastián de los Ballesteros (proksime al Madrido) kun tre varia programo, kies detalojn vi trovos en kongreso@esperanto-es.org. Aliĝiloj riceveblaj ĉe nia asocio.

**Staĝo en Agde**
Survoje al Montpeller troviĝas ĉi tiu bela urbo kiu gastigos E-staĝon inter la 30-a de majo kaj 6-a de junio.Okazos plurnivelaj kursoj kaj la trian gvidos Nina Korjenevskaja, rusdevena esperantistino. Verŝajne, sed ankoraŭ ne konfirmite, partoprenos la staĝon ĉina paro kaj togolanda esperantistoj.

**Kafe (Kultura Arta Festivalo de Esperanto)**
Okazonta inter la 5-a kaj 9-a de julio ĝi prezentos diversstilajn artaĵojn, ĉefe muzikon kiel Ĵak Le Puil, Persone, Jacques Yvart, Kajto, la kataluna grupo Kaj Tiel Plu kaj ankoraŭ multaj aliaj, ankaŭ f-ino Emily Barlaston prezentos sian kabaretaĵon, kaj literatura forumo pri iberiaj verkistoj kaj diversaj atelieroj pri jogo, danco,ktp kaj ekskursoj kaj, kaj, kaj...Nepre antaŭvidu vian partoprenon kaj ne forgesu ke oni akceptas ankaŭ partatempaj partoprenantojn kiuj pagos kvinonon de la kotizo tage.
Detala programo kun aliĝilo ricevebla ĉe nia asocio.

**Internacia Semajno ĉe Mediteraneo**
Temas pri tradicia aranĝo 26-a jara kiu okazas ĉiam en la urbeto Sete ankaŭ survoje al Montpeller inter la 26-a de aŭgusto kaj 2-a de septembro kun diversnivelaj kursoj matene; ekskursoj kaj libera tempo posttagmeze kaj amuzaj, distraj kaj kulturaj programoj vespere. Ankaŭ aliĝiloj riceveblaj ĉe nia asocio.

**Kastelo Grésillon**
Someraj staĝoj denove okazos ĉe la franca kastelo esperantista. Jen la provizora programo por julio/aŭgusto : (15-21 kun tri nivelaj E-kursoj, kantado kaj piedmigrado); (24-29 kun du nivelaj E-kursoj, teatro-praktikado kaj piedmigrado); dum aŭgusto (31-7 ĝis 5-8 kun du nivelaj E-kursoj, prelegoj G.Lagrange) ; (7-12 kun du nivelaj E-kursoj kaj peckudrado); 14-19 du nivelaj E-kursoj kaj jogo).
Kosto de ĉiu staĝo: 180 FF. + aliĝo al la asocio: 50 FF. Manĝoj kaj loĝado estas aldonendaj laŭ aranĝo: en la Kastelo mem (se eblas), en hoteloj, ferioĉambroj en privataj domoj, kampadejoj (ĉe la kastelo aŭ publikaj).

**Internacia Esperanto-Semajno**
La oka Internacia E-Semajno de la kulturo kaj turismo okazos ĉi-jare de la 30-a de septembro ĝis la 7-a de oktobro en la kataluna marborda urbo Blanes. La provizora programo anoncas ke okazos Cseh-kurso gvidata de prof-ino Carla de Lorenzi, pluraj prelegoj kaj debatoj, duontagaj ekskursoj kaj Havankantoj. Aliĝiloj haveblaj ĉe nia asocio.

## Romana juvelo

La ŝtona urbo estas la debuta literatura verko de Anna Löwenstein. Temas pri elstara romano, kiu tre plezure legiĝas kaj senrezerve konsilindas. Bedaŭrinde, ĝi ĉefe famiĝas en Esperantio ne pro ties evidentaj bonaĵoj, sed pro lingva bizaraĵo: nome, ke la aŭtoro uzas preskaŭ nur vortojn aperintajn en la Fundamento de Esperanto.
La verko priskribas en unua persono la vivon de britonino junaĝe kaptita far la romiaj konkerantoj kaj vendita en ilia ĉefurbo kiel sklavino. Ĝi enhavas tri partojn: la vilaĝan vivon en Britio antaŭ la alveno de la invadintoj, la kamparan vivon en romia vilao kaj la urban vivon en Romo. Tra la sensoj de la nur ŝajne naiva protagonisto, la leganto forte impresiĝas el la ĉiutaga vivo de tiuj prauloj kaj rimarkas, kiom ete ŝanĝiĝis la plej esencaj aferoj. Fakte, Löwenstein tre interese renversis la strukturon de la tradiciaj historiaj romanoj — la ĉefrolantoj ne estas ĉi tie patricioj, sed simplaj popolanoj — kaj lerte plektis la rakontan fadenon, kiu pelas la leganton ĉiam antaŭen.
La libro prezentas tre atentokaptajn komparojn, ofte subfosantajn antaŭjuĝojn: inter la barbara Britio kaj la civilizita Romio, inter la kampara vivo kaj la urba, inter centro (Romo) kaj periferio (Britio, Trakio), inter libero kaj sklaveco, inter religio kaj superstiĉo, inter la statuso kaj funkcioj de viroj kaj virinoj (kun signifa kontrasto en la edukado de la gefiloj) k.a. Sed plej substrekindas la procezo de romaniĝo de la ĉefrolantino (kaj ŝiaj idoj) — majstre pritraktita, ankaŭ el socilingvistika vidpunkto.
Kaj tamen, malgraŭ sia multflankeco, la historio ruliĝas senpene...
Samkiel la enhavo, la lingvo de la romano aparte atentindas. Estas mirinde, ke kvankam la aŭtorino tiel draste limigis sian vortostokon (kio ĝis nun estis farita nek de Zamenhof nek de iu ajn elstara verkisto), ŝi tamen sukcesas, ke tiun akrobataĵon oni apenaŭ rimarkas — krom pro la librofinaj klarigoj. La lingvo bele fluas kaj multaj esprimoj plene trafas, eble parte dank' al ŝia ĉiutaga hejma uzado de esperanto — sed tute ne sufiĉas ĉiutage paroli lingvon por scipovi verki (tiel multaspekte fajnan) literaturan verkon.
Nepre legu ĉi novan klasikaĵon de nia literaturo. Vi certe ĝin ĝuos.
Hektor Alos i Font

Anna Löwenstein, La ŝtona urbo, Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 1999, 350 p.

## KORESPONDEMAS

Germana instruistino 34-jara deziras korespondi pri diversaj temoj: **Silke Keiling** – Diensdorfer Str,21 D-01458 HERMSDORF (Germanio)

47-jara pola esperantistino deziras korespondi trarete pri fremdaj lingvoj, psikologio, literaturo, muziko kaj komputiloj: **Zuzanna Jeziorska** – Zuzia_Jeziorska@poczta.onet.pl

Pola esperantisto 26-jara deziras korespondi pri filatelo: **Artur Michalski** – ul.Reuowna, 6/2- PL-93-310 LODZ (Pollando)

## URĜA HELP-ALVOKO

Pola mezaĝa esperantistino, korespondantino de nia aktivulo Éric Collignon el Sabadell, petas monhelpon por alfronti nepran kontraŭkanceran operacion.
Nia asocio peros la donacojn kaj informos pri la evoluo de la afero. Ĉiukvantaj donacoj bonvenas ĉe nia bankkonto 2100-0461-90-0200055053 (nepre menciu "por pola esperantistino").

## Nova ret-kurso

Personaj komputiloj havas mallongan historion: la unua kreita de la firmao IBM ankoraŭ ne aĝas 20 jarojn. Dank' al eksterordinara malaltiĝo de ties prezoj, al multobligo de iliaj kapabloj kaj al faciligo de ilia uzado, laŭ ĵus eldonita statistiko, kvarono de la hispaniaj hejmoj jam posedas almenaŭ unu. Kaj samtempe, per interreto, la antaŭ nelonga iom peniga interŝanĝado de dokumentoj praktike eksiĝis.

Ĉiu ĉi rapidega evoluo igis, ke miriado da organizoj disafiŝadas grandan parton de siaj publikaj informoj en interreto. KEA mem kreis sian TTT-ejon (ret-informejon) jam antaŭ preskaŭ tri jaroj. Fakte por esperantistoj interreto estas vera beno, ĉar ĝi permesas tujajn kaj etkostajn komunikojn tra la tuta mondo; tial ni tre senteble profitas kaj uzas ĉi novan medion.
Unu el la kampoj, kie la reto montriĝas aparte interesa, ne nur por verduloj, estas informado. Kaj elstare gravaj por ni estas la kursoj. Fakte, ĉar la medioj ne tiom malsamas, diversaj homoj kaj asocioj adaptis korespondajn kursojn kaj disponigis ilin en la reto.

Tiel agis Pedro Martín, gvidinstruisto de la koresponda kurso de KEF, kaj aŭtoro de la nova TTT-esperanto-kurso por katalunoj. La adapto estas tre plaĉa kaj larĝe superas la averaĝan nivelon de similaj esperanto-kursoj.
La kurso estas klasika. Ĝi konsistas el 14 lecionoj enhavantaj tekston, vortareton, gramatikon kaj ekzercojn. Klarigoj kaj ekzercoj estas sufiĉe multnombraj, kiel indas en memlernilo. La solvoj de la ekzercoj havantaj nur unu eblan respondon estas konsulteblaj. Kompare kun sia frata papera kurso, la nuna enhavas novajn desegnojn, kiuj ĝin freŝigas. El teknika vidpunkto, la problemon de la ĉapelitaj literoj la aŭtoro solvis per bildoj: la esperantaj tekstoj estas en GIF-formato, kvankam la afero estas tiel lerte farita, ke oni sentas nur etan bremsiĝon dum elŝutado (elreta enkomputiligo) de la lecionoj, almenaŭ se oni havas neaĉan transsend-rapidecon — mi certas tamen, ke post ne pli ol unu jaro tiu problemo jam estos praktike eksa dank' al ĝeneraliĝo de Unikodo (du-bajta norm-signaro); ĉiel ajn la solvo elektita estas nete pli taŭga ol la uzo de hoj kaj iksoj, kiuj multas en similaj lerniloj, kaj pli facila por normala uzulo ol la instalado de speciala ĉapelhava tiparo.

La TTT-kurso estas ankaŭ parte varbilo por formala aliĝo al kurso, kie kontraŭ malalta prezo la lernanto povos libere konsulti fakulon korektontan liajn ekzercojn.
Dua ŝtupo estas surdisketa versio de tiu TTT-kurso. Ĝi enhavas la tutan materialon atingeblan interrete, sed oni povas ĝin konsulti sen aliro al la araneaĵo — kio, cetere, konsiderinde rapidigas la aferon. Aldone, ĉi versio enhavas sep "komplementajn" legaĵojn adaptitajn al la vortprovizo de la lernanto.

La disketo ne nur utilas kiel lernilo por aŭtodidaktoj, sed ankaŭ povas esti valora helpmaterialo por komputemaj lernantoj de klasĉambraj kursoj — ĉefe se ili uzas la saman zagrebidan metodon. Ĝi estas mendebla en la KEF-libroservo.
Mi tre varme gratulas kaj dankas Pedro Martín pro tiu bonega lernilo kaj pro lia elstara kontribuo al la diskonigo de esperanto per TTT.
Hektor Alos i Font

Curs elemental d'esperanto, ILEI-Cat – Associació Catalana d'Esperanto, 1999. http://www.xtec.es/~pmarti10/kurso.htm
Curs elemental d'esperanto, ILEI-Cat – Associació Catalana d'Esperanto, 1999. 1 disquet. 1000 ptes.